

ESPERANTISTA

REVUO POR ESPERANTO EN ĈEĤOSLOVAKIO

Eldonas Esperanto-Asocio en ĈSR, Praha II, Malá Štěpánská 7. - Redaktas Dr. Stan. Kamaryt

Prof. dr. Josef Hendrich:

JAN AMOS KOMENSKÝ A MEZINÁRODNÍ JAZYK

V druhém ročníku na str. 49 přinesli jsme článek prof. Hendricha o Komenského pokusu o umělý jazyk, jak jej podal ve svém spise Panglottia. Komenského spis nebyl vydán tiskem, prof. Hendrich psal svou studii podle rukopisu uloženého tehdy v Halle nad Sálou, Hendrich připravil rukopis Panglottie (Všemluvy) k vydání, Bohužel jeho předčasná smrt vydání zdržela. Uveřejňujeme Hendrichovu předmluvu z jeho literární pozůstalosti.

Rozptýlenost jazyků byla již dávno pocítována jako zlo, ba (podle bible) jako trest. Tento trest se snašel snáze po ta staletí, kdy společným jazykem celého vzdělaného světa byla latina. Ale jakmile vzdělanost přestávala být záležitostí kleriků a stávala se víc a více záležitostí světskou, začala latina ustupovat živým řečem. Poněvadž se nemohla dostatečně přizpůsobovat stále složitějším vyjadřovacím potřebám měnící se kultury, stávala se jazykem mrtvým.

I začala se hlásit touha po jazyku novém, umělém, který by podobně jako latina, ale dokonaleji, zastával úlohu společného tlumočnicka všech národů. Od té doby se začínají opět a opět vyskytovat návrhy, jak takového mezinárodního tlumočnicka, stále potřebnějšího, sestavit. Smělý a vítězný nástup přírodních věd, dodávající naději na věk nového a bezpečného vědění, dodával odvahy také na poli jazykových pokusů.

Pozornosti muže tak širokých zájmů, jako byl Komenský (jenž velkou část svého života věnoval pracím jazykovým), nemohla ovšem ujít snaha o zavedení umělého jazyka. V jeho knize Cesta světla úvahám o novém zprostředkovateli vzájemného dorozumívání je věnována kapitola XIX: Způsob jazyka všeobecného. Její myšlenkový postup je tento:

Hledá-li se obnova veškerého světa, bude třeba pomoci jazyků. Nejjednodušší cesta bude ta, aby se ustavil nějaký jazyk společný celému světu. Latina nedostačuje, je mnoha národům neznámá a pro učení obtížná. Mimo to je nedokonalá. „Uzavíráme tedy, že proti oněm mnohonásobným překážkám a zmatkům vzájemného styku, které vznikají z mnohosti, nesnadnosti a nedokonalosti jazyků, nabývá účinnějšího prostředku než aby se sestavil jazyk nový, nade všechny jiné již známé: 1. snadnější, abychom se mu mohli učít beze ztráty časové i věcné, 2. lahodnější, aby bylo potěšením jemu se učít a naučit, 3. dokonalejší, aby jeho znalost byla velmi užitečná k pochopení věcí samých. Toužíme tedy po jazyku: 1. rozumovém, který by po stránce věcné i formální neměl v sobě nic než co slouží vystižení smyslu (až do nejmenších podrobností), 2. analogickém, který by v ničem neobsahoval nepravdivosti, 3. harmonickém, který by mezi věci a pojmy nevnášel žádných nesrovnalostí,

poněvadž by již pouhým zvukem vystihoval podstatu a rozlišující znaky věcí; již tím by se stal jakýmsi trychtýřem moudrosti. Kdyby ten jazyk byl přijat společným souhlasem lidského pokolení, všichni by s radostí poznávali, že bude nejvhodnějším prostředkem pro vzájemné usmíření lidí a pro usmíření pravdy s pojmy o věcech. Neboť až tehdy se bude moci doba nazývat osvícenou a usmířenou, až světlo a pokoj bude ve věcech, v pojmech věcí a ve slovech, nositelích to pojmů.“ (§ 14 a 15).

„Kdyby se však někdo tázal na způsob, kterým by se dal tento jazyk utvořit, tedy nabízí se způsob dvojitý: totiž buď pod vedením jazyků již známých, nebo pod vedením věcí samých.

První způsob by byl podle vzoru Zeuxidova. Ten, hodlaje malovati Helenu, dal si přivésti panny vynikající krásou, cokoli jen jich mohl míti, a všechno na nich bedlivě zvav v úvahu, přenesl na svou Helenu vždy ten úd, o němž viděl, že u některé daleko nad jiné vyniká; tím způsobem velmi šťastně vyjádřil jakýsi pravzor nejdokonalejšího půvabu. Něco podobného by se mohlo státi také v našem případě, kdyby vše, čím který jazyk vyniká v přesnosti, v kráse a jadrnosti (a sotva který je tak nešťastný, aby v něčem zvláštním ne vynikal nad jiné), to všechno kdyby se sebralo a souladně spojilo v jeden jazyk: aby z mnoha půvabností vzešla jedna, trest' všech půvabů.

Druhý způsob však je věcnější, aby totiž skladatelé nového jazyka sledovali vedení věcí samých, zejména když všechno má být přizpůsobeno jejich přesnému vyjadřování. Neboť teprve v tom případě bude soulad pravý a snadný: věci samy, podávající se smyslu všech lidí tímto způsobem, učiní ten jazyk pro všechny snadno srozumitelným a snadno osvojitelným. Dva z nejdůmyslnějších Francouzů (Mersenne a Le Maire) se domnívali, že již šťastně položili základv takového jazyka. My pak, opíraje se o základv vševědne odvážili jsme se doufatí v jazyk, který by byl desetkrát snazší než latina poněvadž by byl zcela prost všech nepravdivostí: stokrát dokonalejší, poněvadž by pohotově dovedl vyjadřovat všechny rozdílnosti věcí i pojmů; a tisíckrát vhodnější k souladnému vystižení podstaty věcí poněvadž jeho jednotlivá slova by byla jako definice.“

V Cestě světla je tedy podán povšechný program budování jazyka všeobecného. Myšlenky tam rozvinuté Komenský už neopouštěl a nápravu jazykové roztržitosti ne pojal do všeobecné nápravy věcí lidských.

O všeobecné nápravě lidských věcí začal Komenský přemýšlet ke konci třicetileté války. Tato krutá válka vypudila jej z vlasti a dala mu hojně příležitostí pozorovat žalostné následky všeobecného zneprátení a vzájemné nenávisli. Byl však přesvědčen, že všechny bědy

Každý esperantista členem Svazu čs.-sovětského přátelství!

těchto krutých dob jsou jen Boží zkouškou a přípravou nového, lepšího věku. Bůh ničí kmeny a národy, které se mu znelibily, aby připravil cestu jiným, lepším. Do těchto trosek nelze ještě stavět nové budovy. Ale přijde čas, kdy odstranění trosek ukáže pravé stavební místo. Pak bude čas vystoupit na veřejnost, Bůh chystá velkou obnovu; ale co chystá, to chce, jak obvykle, provádět jen za lidské spolupráce. K té spolupráci se Komenský cítil povolán.

Chystal tedy už od roku 1645 velké dílo Všeobecnou poradu o nápravě věcí lidských. Představoval si, že se na úsvitu nové doby podaří svolat zástupce celého světa nebo alespoň světa křesťanského, aby se poradili o všeobecné obnově: a základem jednání že se stane jeho sedmidílná Všeobecná porada.

Na tomto díle pracoval i tehdy, když mřl ukončující válku, mír vestfálský, zklamal tak těžce naděje exulantů. Zvláště horlivě pokračoval po návratu z Uher (1654). Z požáru Lešna zachránil dosti náčrtů, takže hned po svém příchodu do posledního útulku, do Amsterodamu, mohl dáti do tisku obě vstupní části a ještě některé ukázky. Ale večer života už nestačil k tomu, aby celé dílo bylo připraveno pro tisk. Po smrti Komenského se staly pokusy upravit pozůstalé rukopisy k vydání, ale k uveřejnění nedošlo.

Tak jsme znali jen první dva díly Všeobecné porady, Panegersii a Panaugii; pět ostatních částí bylo považováno za ztraceno. Ale před druhou světovou válkou objevil je šťastný badatel, profesor Dimitrij Cyževskij v archivu sirotčince v Halle nad Sálou.

Mezi těmito pěti knihami je také Panglottia, Všemluva, pátá část celého díla poradního. Komenský nemínil podat hotový systém nového jazyka, nýbrž vyložit základ, o který by se mohla opřít společná porada vzdělanců. Snaží se ukázat, že dosavadní jazyky skutečně nedostačují, a v čem nedostačují. Při té příležitosti hledí vždy naznačovat způsob, jak by se ty nedostatky odstraňovaly v jazyce vševědném. A tak nová slova a nové tvary, které čteme v jeho kapitolách, nejsou návrhy, ale příklady, jak by se mělo postupovat. Tyto příklady jsou dvojího druhu. Jedny jsou vzaty z materiálu jazyka latinského. Komenský si tvoří slova, jaká bychom mohli v latině čekat, kdyby jazyk postupoval přísně logicky. Komenský ukazuje, jak by se měly sestavovat tvary slov, aby postup byl úsporný, jasný a výmluvný. Bere tedy latinská slůvka jen pro znázornění, jak by se mohlo postupovat v novém jazyce a s novým materiálem. — Druhý způsob ukáže se neváže na latinu. Má znázornit, jak i součástky nových slov mají býti významonosné, nikoli nahodilé. Podle probíraných zásad tvoří nové kmeny, nové předpony a nové přípony. Ale zase jen jako jednu z možností. Slova by měla být nutným znakem věci, ne shlukem hostejných hlásek. I každá hláska by měla být nositelem významu, takže by slovo bylo takřka definicí své věci. Podle zásady všeobecné harmonie nemohlo by znění slov vznikat jen náhodou nebo diktátem; musí být přilozeným a v dané soustavě i nutným opisem věci, musí k věcem logicky patřit, musí vyjadřovat tytéž ideje v jsoucnu věcném, reálném.

Komenský sám odkazoval navrhovaný jazyk do budoucnosti. Nicméně cítil, že by měl o něm říci něco více a konkrétněji než se stalo ve Všemluvě. Tím si vysvětlíme Pokus o nový harmonický jazyk. Je zachován v rukopisech poradního díla, a to hned za Všemluvou jako jakýsi dodatek. Pokus o nový harmonický jazyk je v podstatě zase programem, i když se tu už opouští materiál latinského jazyka a předvádějí se ukázky, mající aplikovat teorii, jak by se řeč dala připodobnit věcem (aby již pouhým zvukem vystihovala jejich vlastnosti).

Je opravdu škoda i pro českou jazykovědu, že po tři století Všemluva i Pokus byly ztraceny v zapomenutí a že se dostávají na světlo až za dnešních dnů. Komenský mohl už dávno mít jméno i v tom oboru, kde je dosud

přehlížen, v dějinách umělého jazyka. Znalcům vývoje umělého jazyka připadá úkol, aby jeho práci podrobně osvětlili a zařadili. Ale i všichni milovníci jazyka a přátelé mezinárodního dorozumění najdou ve Všemluvě stůl bohatě prostřený.

Ota Ginz:

Ekskurso

(al esprimoj el ĉiutaga vivo)

Estis varmega tago. Irinte de la vagonaro, la infanoj, la malgrandaj sen ŝarĝo — la grandaj kun dorsosakoj¹ — haltis ĉe la rivero.

Tie pramisto² kalfatris³ sian ŝipon. La peĉo⁴ odoris agrable. Li rakontis al la infanoj, ke li ĵus rimarkis lutron⁵. Apude knabo en ĉifita vesto⁶ fosis kaj serĉis lumbrikojn⁷, elrampantajn el la argilo⁸. Li volas kapti maljunan siluron⁹, kiu laŭdire estas tie en la profundo. Ne interesis lin karpoj¹⁰, nek perkoj¹¹, nek barbfiŝoj¹², nek ezokoj¹³.

Netimema monedo¹⁴ rigardis scivole de proksimo. Oni aŭdis alaŭdon¹⁵, kiu estis videbla nur kiel punkto. La infanoj banis sin rapide, ĉar turmentis ilin tabanoj¹⁶. Ankaŭ kuloj¹⁷ ilin persekutis.

Poste ili kuris al la arbaro. Ili renkontis kelkajn belajn vanesojn¹⁸, kolektis faskon da kresoj¹⁹ kaj liknidoj²⁰. En la arbaro ili aldonos konvalojn²¹ kaj tie ĉe la rivereto kreskos certe miozoto²². Ili ĉirkaŭos la bukedon per filiko²³ ne sciante, ke ne estas permesite ĝin kolekti. Belaj estus ankaŭ kalto²⁴ kaj primolo²⁵. Domaĝe, ke ili jam antaŭ longa tempo forfloris. Eĉ ĉi tiel ili portos hejmen belodoran kaj multkoloran bukedon. Al la malgrandulo plaĉis lekantoj²⁶, sed ili estas tro malgrandaj kaj havas mallongajn tigojn²⁷ por kunporto.

La infanoj rapidis ekvidinte frambajn kaj rubusajn arbustojn²⁸ ĉe la rando de la arbaro, tamen la rubusaj beroj ne estis ankoraŭ maturaj.

Unu el la knaboj ekkriis. Ne, ne estis vipuro²⁹, nek kardo³⁰, sed branĉeto robinia³¹. Ne gravas, sed evidente ili ne povos eniri la arbaran senŝuaj. Ĉiuj do surmetis siajn sandalojn. Venenaj serpentoj ne estis tie, sed oni ektimas eĉ senkulpan kolubron³².

Denove ili haltis, nun apud truo, kiu estis ŝajne mela³³. Maljunulo sidis tie ĉe granda fajro kaj allogis efemerojn³⁴. Ho, kiel bele³⁵ flagris³⁶, la fajro, kiam la avo aldonis betulan ŝelon³⁷. Ĉi brulis kiel kandelo. La infanoj enĵetis en la flamojn pinajn strobilojn³⁸, rapide kolektitajn, kaj ĝojis aŭdinte, kiel bele ili krakas. Kie estas strobiloj, tie ne mankas sciuroj³⁹. Kaj vere, super iliaj kapoj saltis de branĉo al branĉo kaj de unu arbo al alia elegantaj sciuretoj. Ĉu ili fuĝis antaŭ imagata danĝero aŭ ĉu ili ludis?.

Unu el la etaj infanoj kunportis salikan vergon⁴⁰. La infano komence rifuzis, kiam la maljunulo ĝin petis. Li fortranĉis nur peceton kaj la grandan reston li redonis. La infano apenaŭ rekonis, ke io mankas kaj ĝojis ricevinte belan salikan fajfilon. Maljuna estis la avo, sed nesperta. La infano komprenoble ekfajfis kaj ne intencis ĉesi spite ĉiujn admonojn, ke tia bruo ne estas permesita en arbaro.

Kaj vere, post tempo nelonga aperis, akompanate de melhundo⁴¹, arbaristo, rekonebla laŭ pafilo, sed krome ankaŭ laŭ plumeto garola⁴² post la ĉapela rubando. Eĉ la grandaj infanoj ektimis la nerazitan viron kun pafilo. La brunto kaŝis rapide en sian plej profundan poŝon la fajfilon, bone sciante, ke li povos per ĝi hejme bone distri siajn gepatrojn.

La arbaristo, malgraŭ la stoploj⁴³ sur la mentono, montrigis homo ne malbona. Verŝajne li havis hejme ankaŭ infanojn. „Ĉesigu la fajfadon!“ li diris tute milde. „Alimaniere vi ne ekvidos cervan familion: cervon⁴⁴, cervinon⁴⁵ kun cervidoj⁴⁶ kaj la belajn damaojn⁴⁷ en la arbaro. Vidu, nur momenton vi silentis kaj ĵus preterkuris kapreolo⁴⁸. Kaj aŭskultu la frapadon supre sur la

arbo. Estas pego⁶, kiu kaptas insektojn al homoj neutilajn kaj tiel helpas nin purigi la arbaron."

"Sed ĝi ankaŭ ŝtelas!", anoncis sin ekkuragiĝinte la petolulo. „Vi eraras, la ŝtelema birdo havas nomon nur similan, estas la pigo⁶! Ambaŭ estas birdoj plaĉaj, sed eble vi vidos ĉi tie ornamon de nia arbaro, la brile bluan koracion⁷. Tamen, rigardu ankaŭ la teron. Post la pluva semajno ekkreskis fungoj. Ne sufiĉus, ke tiel grandaj infanoj alportu hejmen nur florojn. Kaj la glanoj⁸, da kiuj vi havas plenajn poŝojn, ne tro interesos vian patrinon.“ „Mi havas ankaŭ gajlojn⁹!“, fanfaronis la jam tute sentima knabeto.

„Serĉu inter la piceoj¹⁰ tie malantaŭe, tie vi trovos belajn blankajn boletojn¹¹ kaj survoje ankaŭ sufiĉe da kantareloj¹². Por ne erari, prenu neniun alian fungon. Ne kolektu rusulojn¹³, estas tro multe da specoj kaj inter ili iuj ne manĝeblaj. Kaj vi, malgrandulo, la amantojn¹⁴ lasu ĉi tie! Sen ili estus tro unukolora la arbaro.“

„Ni mem kulturis fungojn hejme, ni havas en la kelo belajn psalitojn¹⁵,“ anoncis sin denove la alparolita knabo.

„Bone, la arbaroj estos do baldaŭ nebezonaĵoj,“ respondis la arbaristo. Kaj li daŭrigis: „Ripozu iom ankoraŭ en tiu ĉi bonodora timianeto¹⁶, sed poste iru tien en la koniferan arbaron. Vi malmulton trovos ĉi tie sub kverkoj¹⁷, fagoj¹⁸ kaj karpenoj¹⁹. Jes, la folioj de ambaŭ lastaj arboj estas similaj, sed la fago havas belan glatan selon.“

La infanoj obeis. Ili kolektis ankoraŭ iom da fragoj²⁰ ĉirkaŭ si, dividis inter si brasikrapojn²¹, la reston de la provizo kunportita el la hejmo, kaj ekpaŝis sur musko²², mola kiel tapiŝo, al la densa picearo²³ kaj al la sveltaj abioj²⁴, kiuj altis post la folihava arbaro. Kaj ili diligente kolektis fungojn.

La malgranda petolulo restis ĉiam malantaŭe. Jen li trovis helikon²⁵ jen li persekutis lacerton²⁶, jen li ekaŭskultis kukolon²⁷ aŭ observis kelan birdon, kiu montrigis upupo²⁸. Tamen, liaj buŝo kaj manoj atestis, ke li ĉefe atentis mirtelojn²⁹, kiuj ĉie abundis. Li plendis, ke liaj fingroj estas kungluitaj. Kulpis la rezino³⁰, kiu restis fiksi sur liaj manoj, kiam li deŝiris desur arboj trunkoj likenon³¹.

Dume li rompis ĉiam sian kapon, kiel la arbaristo, homo laŭ aspekto bonkora, povas mortigi ion. Por kio alia li kunhavis pafilon?

Subite ĉiuj ekmalŝatis. Ili ekmemoris, ke ilin hejme atendas la promesitaj farunbuloj kun aneta saŭco³², krome lenta supo³³, ilia mango preferata.

Ĉion kunpakinte, ili direktis sin al la stacidomo. Ili ja revidos baldaŭ la arbaron. Komencas maturiĝi la vakcinioj³⁴, kiujn konfitas³⁵ la patrino.

Jen erinaco³⁶! Lasu ĝin trankvila!

V tĉto krĉtkĉ povidce jsmc pĉnesli sbĉrku vĉrazuĉ, zcela ĉastĉyĉ v naŝi bĉzne mluvĉ. Je tĉreba, abyĉom si je osvojili i v esperantu a zĉroveĉn sprĉvnĉn nĉzvy i dalŝiĉ roslin, tvorĉ a vĉbec vĉci, kterĉ nĉs obklopuyĉ v naŝem dennĉm ĉivotĉ. ĉhodĉme s otevĉenyĉma oĉima a hledeĉjme v slovnĉku, co nĉm nenĉ dosud v esperantu bĉzne. Zapamatujme si tyto vĉrazy, aby se staly trvalou souĉĉstĉi naŝeho hovorovĉho jazyka.

¹ batoh, ² pĉvezoznik, ³ utĉŝnovatĉi, ⁴ smola, ⁵ vydra, ⁶ ve zmaĉkanĉyĉ ŝateĉ, ⁷ ŝizala, ⁸ hlĉna, ⁹ sumec, ¹⁰ kapr, ¹¹ okoun, ¹² parma, ¹³ ŝtika, ¹⁴ kavka, ¹⁵ skĉlivan, ¹⁶ ovĉd, ¹⁷ komĉr, ¹⁸ baboĉka, ¹⁹ ŝeĉicha, ²⁰ kohoutek, ²¹ konvalinka, ²² pomnĉnka, ²³ kapradĉi, ²⁴ blatouch, ²⁵ petrklĉĉ, ²⁶ sedmikrĉsa, ²⁷ chudobka, ²⁸ stonek, ²⁹ malinovĉi a ostruĉini, ³⁰ zmiĉe, ³¹ bodlĉk, ³² snĉtka akĉtovĉ, ³³ uzovka, ³⁴ jezevĉi, ³⁵ jepice, ³⁶ jak pĉknĉ, ³⁷ plĉpolal, ³⁸ bĉrezovĉ kĉra, ³⁹ borovĉ ŝiŝka, ⁴⁰ verkerka, ⁴¹ vrbovĉy prut, ⁴² doprovĉzen jezevĉĉkem, ⁴³ sojĉi peĉiĉko, ⁴⁴ strniŝtĉ, ⁴⁵ jelen, ⁴⁶ jaĉ, ⁴⁷ kolouch, ⁴⁸ darŝk, ⁴⁹ srnec, ⁵⁰ datel, ⁵¹ straka, ⁵² mandelĉk, ⁵³ ŝalud, ⁵⁴ dubĉnka, ⁵⁵ smrk, ⁵⁶ hĉib, ⁵⁷ liŝka (houba), ⁵⁸ holubinka, ⁵⁹ muchomĉrka, ⁶⁰ ŝampion, ⁶¹ mateĉidouŝka, ⁶² dub, ⁶³ buk, ⁶⁴ habr, ⁶⁵ jahoda, ⁶⁶ brukev, ⁶⁷ mech, ⁶⁸ smrĉi, ⁶⁹ ŝtĉhlĉ jedle, ⁷⁰ hlemyŝĉ, ⁷¹ jeŝtĉrka, ⁷² kukuĉka, ⁷³ duĉek, ⁷⁴ borĉvka, ⁷⁵ pryskyĉice, ⁷⁶ liŝejnik, ⁷⁷ knedĉlky s koprovou omĉĉkou, ⁷⁸ ĉoĉkovĉ polĉvka, ⁷⁹ brusinka, ⁸⁰ zavarĉiti, ⁸¹ jeĉek.

„FEBRUARO“

Al ĉeĉoslovakaj kamaradoj
de Junkiĉi Gesi en malliberejo

de S A K A I

Sin svingas, sin kurbas,
en vento februara,
jen nuda branĉaro de ĉerizarbo,
ekster fenestro kun fer-reto. —

Sub haŭto nigra kvazaŭ morta,
via vivo persiste batalas
kun fido, ke nepre printempo venos.
Kuntirante la nukon kontraŭ penetranta vento,
frotante manojn, piedojn frostvunde ŝvelitajn,
mi pri diversaj problemoj leninismaj kunparolas

kun Stalin

en februara izola ĉelo karcera. Ho blanka teroro
povas kateni nur manojn kaj piedojn de mi,
tamen neniel povas min izoligi solece.
Arĝenta kolor' de ĉokoladaj paketoj,
ruĝa rondeva masivo de kolbaso. —
El Eŭropo al Azio trakuras unueca korsento

proletara. —

Tenante ĝin alte, raportas la edzino.

Jen, ŝia mieno brilis hele.

Por montri ĝin al mi, almenaŭ unu momenton,
ŝi venis tre longan vojon

kun vizaĝo ruĝa pro frosto tra vento
februara..

Nu, manĝu ĉokoladojn,
Ho, karaj infanoj,
la patron sopirantaj;
Volu manĝi kolbason,
kara edzino,
laca pro kudra laboro!

Kaj mi, —
inter mi kaj donacoj
vane baras fera nordo.
Ho gefratoj ĉeĉoslovakaj!
Ĉu viaj donacoj ne povis atingi
en manojn al mi en karceroj?

Mia manlato sentas vive
la malsantan sangon de via mano fortika,
kiu batalakiris la februaran triumfon.
Jen nuda ĉerizarbo, jen Stalin,
kaj jen fortika via mano!
Tra mezo de l'uragano de l'epoko
furiizanta tra Oriento,
en fundo de frosto
en izola karceroj februara
mi marŝas la marŝon senhaltan.
Ho, gefratoj de l'lando Gottwalda!
Via februaro estas la februaro nia!

Tradukta el la japana
de japana proletara poeto:
Saburo Ito

Ni aĉetas ĉinin libron
en Esperanto kaj pri internacia lingvo. Proponojn
sendu al Librovendejo de EACSR.

ESPERANTISTA VIVO

Mortis Adela Barešová, poŝta oficistino en pensio en Praha, la 23-an de oktobro 1951 post ne tro longa malsano, 66-jara. Ŝi estis multiara fide'la membrino de E. Klubo en Praha aktive partopreninta en niaj laboroj. Ni rememoros ŝin dankeme kaj la funbrantaĵajn patrinon kaj fratinojn ni petas akcepti nian sinceran kondolencon. **Doktoriĝo.** JUDr Imrich Havas, unu el niaj elstaraj kunlaborantoj en Slovakio, estis promociita la 6. X. 1951 en universitato en Bratislava. Li akceptu nian gratulon kaj bondeziron por siaj pliaj laboroj kaj sukcesoj.

NI LEGIS

La rilatoj inter Unesko kaj esperantistaro dum la pasintaj du jaroj ĉiam plibonigis kulminante per frapa montrado de bonvolo, kiam D-ro Jean Thomas, vicdirektoro de Unesko, salutis Universalan Kongreson en Parizo nome de la ĝenerala-direktoro D-ro Torres Bodet kaj de Administracio de Unesko. Dum la ĝenerala konferenco de Unesko 1950 en Firenze estis adoptita regularo por glatigi kaj raciigi agadon inter Unesko kaj internaciaj organizaĵoj. Laŭ ĝi estas eble starigi oficialajn rilatojn inter Unesko kaj ne-registaraj internaciaj organizaĵoj laŭ tri tipoj. Por la du unuaj tipoj estas kondiĉo aprobo fare de ĝenerala konferenco de Unesko. La tria tipo „neformala rilato“ estas farata laŭ bontrovo de ĝenerala direktoro de Unesko kaj Administracio de Unesko. Kaj tiu rilato inter UEA kaj Unesko estis starigita. Letero de Unesko konfirmanta tiun ĉi staton estas el 9 majo 1951, havas signon: Ref. XR/NGO/224.284 kaj tekstas:

„Kara s-ro Durrant, sekve de niaj diskutoj en Parizo la 7—8-an de majo 1951 mi volas konfirmi nian interkonsenton pri rilatoj inter Unesko kaj UEA.

Konforme al alineo II(3) de la Regularo, de kiu mi kunsendas kopion, via Asocio estas enmetita en Registrilon listigantan internaciajn neregistarajn organizaĵojn, kun kiuj Unesko konservas neformalajn rilatojn. Oni atendas, ke vi indikos, post ekzameno de la Baza Programo de Unesko, pri kiuj aktivajoj viaj anoj havas apartan intereson. Post via respondo la sekretario povos starigi kun via Asocio interŝanĝon de informoj kaj dokumentoj pri aferoj komune interesaj. Via informo krome ebligas al la sekretario sin turni al via Asocio, kiam ajn via konsilo povos helpi al plenumo de specifa projekto en la programo de Unesko.

Mi esperas, ke sur tiu ĉi bazo fruktodona kunlaboro elvolviĝos inter via Asocio kaj Unesko. Sincere via Vladimir Herčík, ĉefo, Rilatoj kun ne-registaraj organizaĵoj.“ (Laŭ UEA-cirkulero.)

Japano Esperantista Asocio malfondiĝis sub la forta premo ekonomia kaj politika en decembro 1950. Tial ankaŭ ĝia organo „Nova Fronto“ estis likvidita. Tio estis tre grava bato al demokrataj progresemaj esperantistoj japanaj. Sed ili sukcesis tuj refondi novan grupon „Esperanto-tomo-no-kai“ (Amika Societo de Esperanto) kaj eldoni novan gazeton „Samideano“ aperantan akurate ĉiumonate. Ni ricevis de tiu gazeto la 4-an numeron (el aprilo) kune kun cirkulero, el kiu ni ĉerpis la suprajn informojn. La kajero havas 20 paĝojn kaj kovrilon, multaj tekstoj estas en la japana lingvo. El la esperantlingvaj estas precipe leginda „El la taglibro de monta vivo“. En la japanlingvaj tekstoj estas multo dediĉita al pacobatalo. Krom la Samideano la Societo eldonas sezonajn eldonaĵojn: Kajeron Socian kaj Kajeron Literaturan. La „Kajeron Socian“ aperintan en printempo 1951 ni ricevis. Ĝi enhavas 40 paĝojn. Ĝi estas interesaj artikoloj. W. Gilbert kaj T. Kurisu klopodas difini, ĉu la interna ideo havas valoron aŭ ne. Gilbert trovas ĝin tute erariga, Kurisu volas difini, kiamaniere ĝi povas utili. Petro Stojan en „scienca skizo Niponia en la homfamilio“ klopodas difini pozicion de Japanoj inter la ceteraj nacioj de la mondo. En la 1-a kajero estas komenco de lia skizo kun multaj strangaj asertoj; li indikas nombron de loĝantaro, al kiu devus malgrandigi sin nacioj por povi bonfarti en sia teritorio. Por Francioj sufiĉas 30 milionoj, por Britoj 25, Japanoj 35, Sovetianoj 95. La „blank-homoj“ povas amike vivi apud „flav-homoj“ kaj apud „nigr-homoj“, sed ne kun, ĉar ne estas bona mikrado inter malsimilaj rasoj. Mi ne kredis, ke tiajn stultaĵojn Hitlerajn ripetos ankoraŭ nun esperantisto. „Samideanon“ redaktas Hukuta-Masao, 6—672 kōenzi, Suginami, Tokio.

En Parizo fondiĝis Akademia Esperanto-Klubo la 16-an de junio 1951 el membroj de la Franca Sekcio de Internacia Scienca Asocio Esperantista. Celo de la klubo estas disvastigi la Internacian Lingvon en la intelektulaj kaj tute aparte en la studentaj medioj unuflanke, kaj utiligi Esperanton por ĉiuj branĉoj de la scienco kaj arto aliflanke. Prez. Prof. G. Waringhien, vicprezidantoj Prof. D-ro Ivo Lapenna kaj Prof. Lucien Laurat, sekretario Ing. Naoumoff (Paris, XII, 3, Av. Gén. Paperrine).

Artikolo de Karolo Piĉ pri „Supersignitaj literoj“ estas citita en Svenska Esperanto-Tidningen La Espero el aŭgusto kiel „tre bona artikolo“.

K kaj kaj. El la raporto de la Literatura Komitato de SAT ni citas:

„Pri la mallongigo k anstataŭ kaj ni opinias, ke ĝi estas akceptebla en vortaroj, sciencaĵoj, teknikajoj kaj similaj verkoj, sed ke en literaturaĵoj oni uzu kaj. (Tio intertempe jam plenumiĝis en la verkoj ‘Ĉu socialisma libereco aŭ kapitalisma servuteco?’ kaj ‘La nuna stato de la evoluismo’).“

Sincere ni ĝojas pri tiu starpunkto. „Sennaciulo“ kiu cetere estas tre bona gazeto, perdas iom el sia valoro pro stultaj „k“, kiuj haltigas la legadon kaj sekigas la aspekton de la lingvo. Espereble oni sekvos la konsilon de la komitato ankaŭ rilate „Sennaciulon“. La motivojn por „k“ mi cetere neniam povis kompreni. Same oni povus arbitre mallongigi „por“ ĝis „p“ k. t. p. ĝis plena nerekonectebleco de la lingvo.

Ni plene aprobas tiujn ĉi liniojn de nia sveda kolego „La Espero“ el aŭgusto 1951.

Pri rolo de intelektuloj en nia movado estas enskribitaj en protokolo pri la kunsido de la Propaganda fako de UEA en Munkeno la 7-an de aŭgusto sekvantaj paroloj:

J. W. Leslie: Ni devas en nia medio havi intelektulojn por eluzi iliajn nomojn.

Ivo Lapenna: Ni bezonas la intelektulojn ne por eluzi iliajn nomojn por la propagando, sed ili devas evoluigi niajn literaturon kaj sciencan kaj fariĝi plej aktivaj batalantoj por nia afero kaj por altigo de ĝia kultura nivelo.

Aperas nun ofte esperantlingvaj prospektoj turistaj kaj trafikaj. Ni povas citi sole kelkajn el la lasta tempo: Spa kaj Bruges en Belgio, Roma kaj Como en Italio, Bamberg, Bonn, Konstanz en Germanujo, Angers en Francujo, Besso en Japanujo, Germanaj Fervojoj, nederlandaj aerlinioj KLM, belga aertrafika kompanio Sabena.

Interstena Informilo (redaktas C. Daglio, via Campagna 35, Tortona, Aless. Italio) estas folietoj aperantaj neregule (n-ro 8 en decembro 1949, n-ro 11 en februaro 1951, n-ro 12 en junio 1951), kiuj instruas internacian skribon, specon de stenografio uzebla por ĉiuj lingvoj inkluzive la ĉina, japana kaj simile. La folioj estas riceveblaj de la supra adreso por afranko de fremdlanda letero.

Dum Tutjapana Medicina Kongreso en Tokio la 1—5 de aprilo aranĝis Japana Esperantista Medicina Asocio kunvenon, kiun ĉeestis 33 samideanoj. Oni sciigis, ke baldaŭ reaperos Medicina Revuo. Kuracistoj, kiuj volas kontakti JEMA, skribu al D-ro Hideo Shiroda, UEA-delegito, en Kasumicho, Yamagata-shi. (Laŭ „Esperanto“ el sept.)

La 15-an Jugoslavan Kongreson de Esperanto partoprenis ĉ. 500 p., inter ili vizitantoj el Aŭstrio, Aŭstrio kaj Nederlando. La registaro estis reprezentita de ministro por kulturklerigaj aferoj Boris Zicherl. (Laŭ „Esperanto“ el sept.)

Zamenhof-straton en Tel-Aviv oni inaŭguris en majo 1951 dum la 2-a E-kongreso en nova kolonio Nov-Bialistoko. („Esperanto“, sept.)

„Voĉo de forlasita patrino“ tradukita de Josef Odenal aperis en La Esperantista Laboristo, jul.-aŭg. 1951.

Foliumi en lastaj kajeroj de Franca Esperantisto estas agado agrabla kaj lerniga. Ofte oni esploras tie metodojn de nia laborado propaganda. E. E. Yelland (marĉo 1951) demandas, kial planlingvoj ne pli rapide disvastiĝas kaj konstatas: „La ĉefa obstaklo estas, ke nuntempe oni ne povas akiri per iu ajn planlingvo sekuran kaj bone pagatan postenon. Tiu manko estas la kaŭzo de la nerapida disvastiĝo de planlingvoj.“ Li refutas saĝe aserton de M. de Guesnet, prezidanto de „Interlingue-Union“, en „Cosmoglotta“ (novembro 1950), ke nombro de esperantistoj estas sole 25 000, ĉar tia estas sumo de membroj de UEA, SAT kaj Franca Unuiĝo. (En tiaj occidentalistaj asertoj estas dokumentita ilia naŭva sinteno al problemoj de helpa lingvo internacia, permesas al si diri nia redaktanto.) En la sama numero oni konsilas direkti nian propagandon al specialistaj medioj, ne al simpla apudulo, kio utilis en epoko komenca, antaŭ la unua mondmilito. — „Ho jes, ... for lingvajn polemikojn“ estas represo de artikolo de karmemora D-ro Corret. Tamen, ŝajnas al ni, la situacio (lingva) de Esperanto estas nun multe eĉ esence, pli alta, pli forta, ol dum tempo, kiam la artikolo estis verkita.

Nürnberg, esperantlingva prospekto, 6 paĝa, en tre bona lingvaĵo, kun tre intua „Mallonga rondiro“. Eldonita kaj ricevebla de Verkehrsverein, Lorenzer-str. 31/III.

Al pacdefendantoj en koloniaj kaj kapitalismaj landoj titolas kanto, kies vortojn kaj melodion verkis G. S. Ĉin kaj tradukis en Esperanton S. J. Sŭ, eldonis Verdstela Ĥoro de Sanhaja E-Ligo (P. O. Kesto n-ro 636, Sanhajo, Ĉinio).

Hungario titolas informa kaj propaganda libreto (24 paĝoj 23×22 cm) riĉe ilustrita, eldonita de Hungara Informa Kontoro por Fremdultrafiko (IBUSZ en Buda-pest V., Deák-utca 2). Ĝi ne estas nura turista logilo. La teksto dokumentas pri aŭdaca hungara konstruado de socialismo. „Historio en nukso-ŝelo“ scias en malmultaj linioj doni impresan liston de hungaraj liberecmilitoj kaj ribeloj kontraŭ la ekonomia, politika kaj nacia subpremoj. La traduklingvaĵo estas tre bona. Por „sturmuldo“, uzata de ni kaj de „Internacia Kulturo“ ĝi diras „avangard-laboristo“. La vorto bone esprimas la ideon, sed estas nepre tro longa. Iam ŝokas nin uzo de „kun“. „La vivnivelo estis kun 37 % pli alta.“ Nepre devas esti „je“. Sed tion ni diras por pruvi nian atentan legadon de tiu bela kaj instrua broŝuro ne por mallaŭdi la aŭtoron de la traduko. Senpage ricevebla laŭ la supra adreso.

Du svedaj maristoj, s-oj Lindkvist kaj Blomberg, kies ŝarĝŝipo „Boogabilla“ alordiĝis en Melbourne (Aŭstralio), restis kelkajn semajnojn ĉe aŭstraliaj esperantistoj. S-o Lindkvist prelegis en Melbourne pri sia gepatra urbo Malmö. (Laborista Esperantisto, julio 1951, Amsterdam).

Arabaj murafiŝoj en Anglujo. — Sude ĉe la enfluo de la rivero Tyne en la maron, en la industria nord-orienta parto de Anglujo, kuŝas la urbo South Shields. En ĝia dokaro estas diversrasaj loĝantoj. Interese estas konstati, ke dum la elektado de urba konsilantaro oni presigas tie la murafiŝojn dulingve, en la araba kaj la angla. — (The Worker Esperantist, London nro 68/1951.)

Zamenhof-portreto. Nova prezo!

Ni estas devigataj postuli por afrankita livero de la bildo en kadro kun vitro Kĉs 230,—. La bildo sen kadro kostas Kĉs 60,— afrankite.

KRONIKO ENLANDA

350 jaroj de post la morto de Tyge Brahe. Esperantistoj ornamis lian tombon. — La 23-an de oktobro 1951, dum la antaŭvespero de 350a datreveno de morto de Tyge Brahe, kolektiĝis ĉe lia tombo en la preĝejo de Dipatrino en Praha grupo de membroj de Esperantista Klubo en Praha. Plenumante la deziron de danaj esperantistoj, ili ornamis la tombon per florkrono kun silkaj rubandoj, kiujn por tiu celo sendis Centra Dana Esperantista Ligo.

La prezidanto de E. K. en Praha s-o Jaroslav Ŝustr parolis super la tombo, substrekis supre diritajn cirkonstancojn, kaj i. a. diris: „Tyge Brahe, granda filozofa, eminenta sciencisto kaj saĝulo, kuraĝa kemiisto, lerta mekanikisto kaj astronomo, en sia epoko el la plej grandaj, elpelita el sia patrujo, vagis tra Eŭropo, por fine trovi en Praha novan hejmon. Sed ne nur novan hejmon li trovis ĉi tie, varman akcepton, admiron kaj estimon, favoron de la sciencularo kaj altan favoron de la ĉeĥa reĝo kaj imperiestro... kaj post sia tragedia morto ankaŭ la lastan ripozon. Esperantistoj en Praha jam multfoje konvinkiĝis, kia ligilo inter la nacioj dana kaj ĉeĥa estas ĉi tiu dana tombo en Praha. Kiomfoje en la pasinteco ili devis gvidi al tiu ĉi tombo okazajn danajn gastojn, kaj kiom da danaj esperantistoj ili surprizis per tio, ke ili neatendite venigis ilin ĉi tien!“

Samideano Josef Vitek, en Danujo bone konata, parolis pri la vivo de Tyge Brahe, kaj pri rilatoj ĉeĥaj-danaj.

Dum kelkaj tagoj brulis apud la tomba monumento du kandelagoj. La rubandoj de la florkrono kun la teksto: „Tyge Brahe en memoro — Centra Dana Ligo Esperantista“ estas multe atentataj de vizitantoj de tiu ĉi historia preĝejo.

Paroĥestro P. Rudolf Wagenknecht dum sia prediko la 24-an matene rememorigis la datrevenon de la morto de la dana astronomo, informis pri antaŭvespera okazintaĵo apud la tombo, kaj invitis la ĉeestantaron rigardi la florkronon kaj legi, ke Danoj helpe de siaj esperantistoj ne forgesas sian samlandanon. (EKP)



Grupo de esperantistoj antaŭ la tombo-ŝtono de Tyge Brahe en Týn-preĝejo la 23. X. 1951

En lernejoj ekzistas laŭ nia ĝisnuna scio en la jaro 1951—52 interes-rondetoj por Esperanto en jenaj urboj: Chomutov, industria lernejo, gvidata de Mucha kaj Pastor. Jablonec n. N. ĉe Klubo de pionir-korespondantoj gvidata de Jira en Pionýrský dŭm. P ř í b o r en mezlernejo, gvidata de lerneja direktoro Sattke. (J. M.)

La poŝto vin trovos, se vi estas esperantisto. Jes, sed sole tiam, se vi estas esperantisto organizita! De tempo al tempo ni ricevas leterojn, kiujn nia poŝto ne povis enmanigi pro neĝusta aŭ nekompleta adreso. Ni devas

konstati, ke niaj poŝtistoj estas nekutime lertaj rekonante, ke la adresato estas esperantisto. Tiam ni rigardas en la grandan nomaron de esperantistoj organizitaj en EAĈSR kaj la sendaĵo venas en la ĝustajn manojn. — Jus nun okazis tiel pri letero de japana samideano Hiro-taro Kobajaŝi el Fukuŝima. Li ne preterlasis noti sur ĝi sian detalan, multvortan, adreson, sed la leteron mem li direktis simple al: „S-o Jarek Dočekal, Ĉeĥoslovakio“. Tiu adreso ne sufiĉis al niaj poŝtistoj, sed ili vidis, ke s-o Dočekal estas esperantisto. La letero venis al ni, ni kompletigis ĝin per indiko de loko „Drahotuše u Hranic“ kaj kiam vi legas tion ĉi, la letero estas jam delonge en posedo de samideano Dočekal. (O. G.)

Trinec. Laŭ la invito de Esperanto-Rondeto ĉe Uzina klubo sindikata de la loka nacia entrepreno Ferfabrikaj okazis ĉi tie la 20—21 oktobro 1951 regiona kunveno. Sabate vespere: propaganda parolado de Rud. Hromada en granda salono de Popola Domo. Partoprenis 300 p. logitaj de la kroma amuza programo konsistanta el muziko, ĉeĥaj kaj esp. kantoj de Molotovi (junulara ĥoro de la lokaj fabrikoj). Polan parton de la amuza programo prizorgis la kultura referento Wawrosz. En unuaktaĵo Patro ne plu (de Lud. Krysta) rolis Blahut, Walicowa, Pomykacz. Post la programo danco. Esperanto-ekspozicio en apuda salono eminentiĝis per multo da bela materialo, precipe multaj libroj pruntitaj de pluraj samideanoj el Trinec kaj ĉirkaŭaĵo. Dimanĉe matene vizito al la ekspozicio kaj trarigardo de la urbo, posttagmeze laborokunsido. Partoprenis 40 p. el 7 lokoj de la regiono. Gvidis la reg. peranto Vlad. Slaný. Raportoj de la lokaj reprezentantoj, referato de Rud. Hromada. Poste unuaktaĵo „Forlasita“, en kiu rolis Blahut, Walicowa kaj Sýkora.

La necesajn aranĝojn faris f-ino A. Milatová, s-oj A. Klimša, Sýkora kun aro da diligentaj helpantoj, kiuj meritas dankon por sia sindono. Trinec, kiu antaŭ la milito havis fortan movadon, estas sur la plej bona vojo fariĝi denove bastiono de nia movado en tiu loko, proksima al la slovaka kaj pola landlimoj.

Regiona kunveno de regiono Gottwaldov en Gottwaldov-Otrokovice okazis la 6—7 oktobro 1951. Aranĝis ĝin Esperantista Rondeto ĉe Uzina klubo sindikata de la nacia entrepreno Svit. La kunvenon partoprenis pli ol 200 p. el 52 lokoj de la respubliko (inter ili 13 lokoj de la regiono). Ĉeestis samideanoj eĉ el Cheb, Most, Liberec. El Gottwaldov ĉeestis 68, Ostrava 23, Veselí n. M. 20, Brno 8, Břeclav 8, Praha 6, Olomouc 6, Bojkovice 4, Opava 4, Uherské Hradiště 4, po 3 el Hradec Král., Hradec u Opavy, Rychnov n. Kn., Luhačovice, el pliaj 38 lokoj po unu-du samideanoj. La kunveno similis malgrandan kongreson ne sole pro tiu ĉi granda partopreno, sed ankaŭ pro la imponaj aranĝoj en luksa medio de la societa domo laborista. — La sabata interkonata ĝis vespero okazis en la malnova foirdomo. Post la bonvenigo de la regiona peranto Fr. Omelka ni aŭdis vortojn de dro Zamenhof (M. Otřisalová), La Vojon de Zamenhof (J. Šebesta), Marjino Magdon de Bezruč (M. Karasová), bedaŭrinde en tute nepoezia traduko. Bele impresis La leterportisto de Jiří Wolker en esp. traduko de Omelka, dirata en malluma salono dum projekciado de belaj akompanbildoj. Krom tiuj ĉi pure esp. programeroj ni aŭdis violonon kaj pianon de E. Valový kaj M. Steckerová, Konfeson de amo al la ĉeĥa lingvo (Fr. Kříž kaj J. Zapletal), naciajn kantojn prezentitajn de la kolega kantista ĥoro de la Uzina klubo kaj fine ni vidis rusajn naciajn dancojn prezentitajn de knabinoj el Junulara Asocio. — Ekster la programo prof. Jos. Kožený deklamis esp-e poemon de Jindřich Hořejší: Min skuis ĝis hieraŭ stranga sent' (trad. Hromada) kaj plurajn ĉeĥajn poemojn, ĉion per sia majstra kaj plaĉa maniero. Post la programo danco ĝis la 1-a horo nokte.

Dimanĉe matene vizito al la E-ekspozicio, lokita en speciala ejo de la Societa domo, en vitrinoj kaj kadroj disponigitaj de la Uzina klubo. De la 9-a ĝis la 10-a okazis labora kunsido de la junularo, de la 10-a horo labora kunsido regiona, en kiu parolis la prezidanto de la Uzina klubo, k-do Polický, la honora prezidanto de la kunveno Th. R. Čejka, prez. de EAĈSR A. d. Malík (pri la politika situacio), R. Hromada (pri la nuna situacio de E. en nia respubliko), MUDr. L. Izák (Martin) pri situacio de la movado en Slovakio. Sekvis raportoj el unuopaj lokoj kaj elektoj. Kiel regiona peranto estis elektita denove Fr. Omelka, Gottwaldov-Otrokovice 714. Kiel distriktaĵo perantoj estis elektitaj: Vsetín — Berka, Veselí — Pavlacký, Uh. Brod — Tichoň, Uh. Hradiště — Vilémová, Kroměříž — Suchánek, Holešov — Flašarová, Gottwaldov — Honsová, Valašské Meziříčí — Müll. Sen distriktaĵo perantoj restas: Hodonín, Valašské Klobouky, Kyjov. Estas dezirinde, ke samideanoj, kiuj volus esti perantoj en tiuj ĉi tri distriktoj, anoncu sin al regiona peranto.

La fotografadon prizorgis kolegia Foto-rondeto Uzina. La kunveno, zorge preparita de ges-oj Omelka kun helpo de sindona kaj diligenta grupo da lokaj samideanoj, igis nin pensi pri tio, kiel povos evolui nia afero en la kadro de la sindikata movado, se ĉio dependos nur de la volo de la esp-ista popolo mem... Hm.

